Biciklista Esperantista Movado Internacia

estas la klubo por ĉiuj, kiuj ŝatas bicikli kaj parolas Esperanton. Aliĝo estas senpaga.

Karavanoj

Plurfoje en la jaro, en ajna sezono, vi povas partopreni kun ni en biciklovojaĝoj al Esperanto-renkontiĝoj, aŭ aliaj interesaj lokoj. Tipa karavano daŭras kelkajn tagojn, kun distancoj de po 50–70 km tage, sovaĝa tendumado kaj memzorga kuirado.

Brevetoj

Pluraj BEMI-anoj partoprenas nome de nia klubo en longdistancaj biciklosportaj eventoj, inter tiuj la fama *Parizo–Bresto–Parizo*. BEMI estas agnoskita klubo en la monda federacio de tiu sporto.

Biciklo-renkontiĝoj

Vi povas partopreni en la BEMI-semajnoj. Ĉiun tagon ni ekskursos al aliaj interesaj lokoj en bela kaj varia pejzaĝo, kaj revenos al nia bazejo.

Popularigi bicikladon inter esperantistoj

BEMI-anoj prezentas la agadon de nia klubo en internaciaj Esperanto-renkontiĝoj. Ili rakontas pri la spertoj de niaj membroj dum biciklovojaĝoj ĉie en la mondo. Ili interŝanĝas informojn kaj spertojn pri politiko por progresigo de biciklado, kaj montras al esperantistoj la multajn avantaĝojn de biciklema vivstilo.

Popularigi Esperanton inter biciklistoj

Dum siaj biciklaj ekskursoj, vojaĝoj kaj sportumadoj, BEMI-anoj rakontas al aliaj biciklistoj pri la avantaĝoj de Esperanto por biciklado, la facila interŝanĝo de informoj kun homoj en aliaj landoj, la helpemo inter esperantistoj, la senpaga tranoktado per Pasporta Servo ktp.

BEMI estas faka asocio de **TEJO**, la Tutmonda Esperanto-Junulara Organizo.

Pliaj informoj en interreto je:
https://bemi.tejo.org

Kreis: Lars Sözüer – lasta aktualigo: februaro 2020